ANTAŬEN suplemento de Informilo

3/32 septembro 2024

Enhavo: Esperantaj monsistemoj Konga Stelo

# Pasintaj kaj nunaj internaciaj Esperantaj monsistemoj

## SPESO, STELO, MONO, MONERO



*Ludvík Lazar Zamenhof (1859-1917*

## SPESO

En 1907, la svisa esperantisto René de Saussure (1868-1943) proponis la kreadon de la internacia monunuo **SPESO** uzata de la internacia movado de esperantistoj. Saussure estis profesie matematikisto, interlingvisto, esperantologo kaj tradukisto.
Tiu ĉi valuto estis tiam uzata de **Ĉekbanko esperantista** kaj ankaŭ de kelkaj britaj kaj svisaj bankoj ĝis la unua mondmilito.



*Ag-monero 1 spesmilo - averso*


*Herbert Höveler (1859-1918)*



*Ag-monero 1 spesmilo - reverso*

Mil unuoj de la nova valuto nomiĝas **spesmilo** - vidu la bildon supre - la simbolo **₷** estas klare videbla sur la bildo de la monero. En ĝia malsupra parto estas donitaj la datoj "1887-1912", ĉar ĝi estis eldonita okaze de la 25-a datreveno de la eldono de la unua Esperanto-lernolibro. La valoro de unu spesmilo estis fiksita je 0,733 gramoj da pura oro, kiu tiutempe valoris 50 usonajn cendojn (1/2 dolaron), aŭ du britajn orŝilingojn.
Moneroj je la 1 spesmilo kaj la 2 spesmilaj moneroj estis monfaritaj de la svisa firmao Holy Frères kaj estis prezentitaj ankaŭ dum la Universala Kongreso de Esperanto en Berno (Svislando) en 1913.
En la sama jaro - 1907, la germano Herbert F. Höveler (1859-1918) fondis la jam menciitan financan domon Ĉekbanko Esperantista. Tiu ĉi banko baziĝis en Londono (ĝi havis filiojn en Dresdeno kaj Moskvo) kaj permesis labori kun ĉekoj esprimitaj en spesmiloj, kiuj estis vaste uzataj de la tiama Esperanto-komunumo. En 1914, la banko jam havis 730 kontojn en 320 urboj kaj 43 landoj. Bedaŭrinde, tiu projekto falis kiam Höveler mortis en 1918 kaj neniu posteulo volis transpreni ĝin. La projekto reviviĝis nur en 1927, kiam du nederlandanoj **Dreves Uitterdijk** kaj **d-ro. J. van Hengel** (pli poste direktoro de la Monfarejo en Utrecht)

fondis bankon nomitan Universala Spesmila Banko en la urbo Laren norde de Nederlando. Pluraj spesmilaj banknotoj ankaŭ estis emisiitaj - la valuto estis konvertebla al oro, sed la projekto kolapsis en la fruaj 1930-aj jaroj.

## STELO

La **STELO**-valuto estis kreita en 1959 laŭ iniciato de Universala Ligo. La evento unue komenciĝis per la emisio de paperkuponoj, kiel monbiletoj, kun nominala valoro de unu stelo. En la sama jaro, 10 000 bronzaj moneroj kun valoro de 1 stelo estis monfaritaj.
Unu mondo, unu lingvo, unu valuto - ĉi tiu slogano gravurita sur la reverso de tiu ĉi monero (1 stelo) esprimas la unuecon, kiun la esperantistoj celis por propagandi sian lingvon. Poste, 10,000 latunmoneroj kun valoro de 5 steloj kaj 10 000 kupro-nikelaj moneroj de 10 stel estis monfaritaj. La moneroj estis monfaritaj de la nederlanda ŝtata monfarejo en Utrecht laŭ la dezajno de la fondinto de la Universala Ligo, **Andreas Cseh** (1895-1979). Liaj geavoj kun la familia nomo Čech /legu: ĉeĥ/ devenis el la kuracurbo Bohdaneč /legu: bohdaneĉ/ apud la regiona urbo Pardubice. La nomon de la stampilgravuristo mi ne sukcesis trovi en la literaturo. Direktoro de la monerfarejo **d-ro. van Hengel** oficiale transdonis ilin al la reprezentantoj de la Universala Ligo en junio 1960. En la sama jaro okazis en Bruselo la 45-a Universala Kongreso de Esperanto, dum kiu ilin akiris centoj da esperantistoj el la tuta mondo. Vidu la sekvajn bildojn:



*1 stelo (bronzo)*



*5 steloj (latuno)*



*10 steloj (kupro+nikelo)*

En 1965 sekvis la monerfarado de 25 steloj, nome 1 000 pecojn el kupro-nikelo 5 000 pecojn el arĝento kaj 10 pecojn (numeritaj) el oro. La parametroj de la moneroj estas pli bone montritaj en la sekva tabelo:

| Nominalo | Jaro | Metalo | Ø | Pezo | Nombro |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 stelo | 1959 | bronzo | 20 mm | 3,4 g | 10 000 |
| 5 steloj | 1959 | latuno | 23 mm | 5,0 g | 10 000 |
| 10 steloj | 1959 | Cu/Ni (75 % Cu + 25 % Ni) | 28 mm | 9,0 g | 10 000 |
| 25 steloj | 1965 | Cu/Ni (75 % Cu + 25 % Ni) | 37,8 mm | 19,0 g | 1 000 |
| 25 steloj | 1965 | Ag (900/1000) | 37,8 mm | 25,0 g | 5 000 |
| 25 steloj | 1965 | Au (983/1000) | 37,8 mm | 50,0 g | 10 |




*25steloj(CuNi)    25 steloj (Ag kaj Au)*

En la 1960-aj jaroj de la pasinta jarcento, tiu ĉi valuto estis uzata por kovri malgrandajn pagojn inter unuopaj landaj

Esperanto-asocioj kaj ankaŭ ene de tiuj asocioj – ekz. pago por aĉeto de reklamaj flugfolioj kaj aliaj aĵoj, vojaĝkostoj, rekompencoj por aktivaj, aŭ meritaj, membroj, ktp. En la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento Universala Esperanto-Asocio proponis ilin libere vendeblajn nur kiel suvenirojn.
Post 2010, ĉe E-aranĝoj estas uzataj plastaj moneroj en valoroj de 1, 5 kaj 10 steloj:



1 stelo (korna strigo) 3 steloj (papago) 10 steloj (krokodilo)

Sur la averso de la monero, kiu valoras 10 stelojn, estas bildigita krokodilo, kiu memorigas pri Esperanta vortludo, aŭ ian mokon: ĉar „krokodili" signifas paroli inter esperantistoj en sia gepatra lingvo, aŭ tia societo estas indikita kiel nesto de "korna strigo", tial la animalo estas prezentita sur la averso de la 1-stela monero. Papago estas montrata sur la 5-stela monero, kiu indikas tre paroleman homon.
Ĉi tiuj moneroj estas administritaj de tabulo nomata Stelaro, kiu ankaŭ determinas ilian valoron. En aprilo 2017, la monunuo "1 stelo" estis taksita je proksimume 0,24 eŭrocendoj, aŭ alie: 1 eŭro = 4,2 stelo.
Por memorigi la 150-an datrevenon de la naskiĝo de René de Saussure, aŭstra ĵurnalisto, esperantisto kaj eldonisto el Vieno Mag. Walter Klag kontaktis monerfarejon en Vieno kaj laŭ konsento preparis proponon monfari 1000 da unu-uncajn (1 Oz) arĝentajn monerojn (999/1000) kun nominala valoro de 100 steloj. En 2020, aliaj arĝentaj moneroj kun nominala valoro de 50 steloj estis monfaritaj omaĝe al la 100-a datreveno de la 12-a Universala Kongreso de Esperanto en Hago kun portreto de la elstara nederlanda esperantistino

Julia Isbrücker (1887-1971). Ĉi tiuj moneroj ankoraŭ estas vendataj ĉe: *Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, 1190 Wien, Österreich (Aŭstrio), e-adresa: esperanto@chello.at, tel.: 004313698629.*




*100 steloj 2018, pezo 1 Oz, Ag (999/1000)*




*50 steloj 2020 kun portreto de J. Isbrücke*



*René de Saussure (1868-1943)*



*Julia Isbrücker (1887-1971)*

## MONO

---



*Daniel Solomon (*1973)*




*Bankbileto 100 Monoj*

En 2008, la franc-dana (alie deklarita kiel israela) artisto-muzikisto **Daniel Salomon** (*1973) fondis pere de la

neoficiala Esperanto-organizo „Heliko“ tiel nomatan Sennaciecan Bankon. Ĉi tiu speco de la "arta banko" eldonis monbileton de 100 Monoj - vidu la bildon supre. Kvankam tiuj biletoj estas konsiderataj kiel nur arta kaj reklama projekto, ili estas presitaj de komerca monpresejo ie en Azio. Ludvík Lazar Zamenhof, estas prezentita sur unu flanko, aliflanke estas heliko, kiel simbolo de la Heliko-organizo. Mi ne vidis la reverson kun la heliko, tial mi ne povas reprodukti ĝin ĉi tie.

## MONERO

En 2014, la kripta valuto, **MONERO**, estis kreita. Ĝi estas la sama teknologio kiel la kripta valuto Bitcoin. Monero-valuto estas grava ĉar ĝi estas anonima (ni ne povas scii la pasintajn transakciojn, la kontojn uzatajn aŭ la kvanton interŝanĝitan.
En novembro 2021, "1 Monero" valoris proksimume 258 USD. La sekva tabelo montras kiel aktuale valoras **Monero** kompare kun aliaj kriptaj valutoj:

**Ĉefaj kriptaj monsistemoj**

| | | |
|---|---|---|
| Bitcoin | 69721.4 $ | 1595455 Kč |
| Bitcoin Cash | 471.3065 $ | 10785.04 Kč |
| Dash | 26.75183 $ | 612.1703 Kč |
| EOS | 0.71026 $ | 16.25309 Kč |
| Ethereum | 3683.838 $ | 84298.37 Kč |

**Ĉefaj kriptaj monsistemoj**

| | | |
|---|---|---|
| Litecoin | 79.8705 $ ↓ | 1827.7 Kč ↓ |
| **Monero** | **179.1348 $ ↑** | **4099.197 Kč ↑** |
| NEO | 13.50091 $ ↓ | 308.9455 Kč ↓ |
| Stellar | 0.100216 $ ↓ | 2.293283 Kč ↓ |

*Kompilis kaj esperantigis Josef Kříž*

# APERAS LA UNUA KONGA STELO

Saluton kara, jen Konga Stelo por vi:

Konga Stelo estas la oficiala informilo de la Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo DKEJO. La aperigo de tiu informilo estas unu el la ĉefaj celoj de DKEJO. Post plurmonata prokrestado celante reliefigi la enhavon de ĉi tiu informilo el ĉiuj esperantistaj kongaj strukturaĵoj t.e. inter DKEJO, la Konga ILEI-SEKCIO kaj DKEA; la unua numero aperis ekskluzive sub la kunlaboro de la konga sekcio de ILEI kaj la konga sekcio de TEJO, (DKEJO) tio rezultas el fekunda kunlaboro inter la Prezidanto de la konga sekcio de ILEI Joel Muhire kaj la sekretario de DKEJO Espoir Ngoma Kasati

Ni petas vin elŝuti la bultenon por informiĝi pri kio okazas en DR. Konga movado.  Kunverkis, Espoir Ngoma Kasati, Joel Muhire

https://uea.org/vikio/Dosiero:KONGA_STELO_REVUO.pdf.

Viaj kritikoj, sugestoj kaj konsiloj helpos plibonigi la duan revuon. Vi povas ankaŭ dissendi ĝin al aliaj ĉefe al tiuj kiuj venos baldaŭ al Aruŝo. Ĝi entenas lecionon pri la svahilaj salutoj.
Bonan legadon. Amike Joel Muhire, la redaktoro.